

LANAĴOJ

P. HUYGHEBAERT
15, Grande Place,
NIEUWPOORT (Belgujo).

Telef. Nieuport 6.
Komerca Enskribo Furnes 3300.
Poŝteka konto 3185.98.

78
Nieuwpoort, la 5^o de Julio 1932

ESTIMATAJ GESAMIDEANOJ,

Tiu ĉi letero celas atentigi vin pri nova organizajo de vendado per eksporto, kiu intencas preterlasi la nunan pli kaj pli mallarĝan ĉeligon de la landoj: pro tio, kreita de Esperantisto, ĝi turnas sin al la Esperantistaro. La iniciatanto sukcesis konvinki la plej potencajn fabrikejojn en Belgujo kaj Francujo pri necesa unuiĝo. Sekve, li petas, ke ĉiuj delegitoj de U. E. A. kaj ĝenerale ĉiuj, kiuj deziras plibonigi la komercajn interrilatojn per kaj por Esperanto, sin informu, ĉu, inter iliaj konatuloj kaj amikoj, ne ekzistas eblaj aĉetantoj aŭ uzantoj, kiuj povas esti interesataj pri lanaĵoj:

Lanfadenoj el ĉiuj koloroj por la vendado po malgrande pere de pogradaj firmoj.

Lanfadenoj el ĉiuj tipoj por uzi en fabrikejoj de vestoj, ŝtrumpoj, subvestoj, k. t. p. La longa ekzistado de tiuj belgaj kaj francaj lanfabrikejoj certigas ilian honestecon kaj neriproĉeblajn varojn. La Esperantisto, kiu organizis tiun vendoficejon, respondecas persone pri la bona efektiviĝo de ĉiuj kontraktoj.

Ebla aĉetanto povas ĉiam sendi, sen ia devigo, specimenon de lanprodukto, kiun li deziras. Tuj estos resendata al li la diritan specimenon, kun nia plej proksima similaĵo.

Estas nun la tempo por montri la utilecon de la helpa lingvo, kaj ĉiuj Esperantistoj estas certe konvinkitaj ke la fakto sin reciproke helpi, ne estas krimo kontraŭpatruja. Ju pli kreskos la intersanĝoj, des pli la paca vivo estos ebla.

Pro tio, la subskribinto varme alvokas ĉiujn Gesamideanojn al bonvola kunlaborado kaj petas ilin sendi ĉiujn sciigojn, kiuj permesos al li interrilati kun eblaj aĉetantoj. Estas plue notinda ke, krom en Esperanto, la vendoficejo korespondas laŭbezzone en lingvoj angla, franca, germana, juda, nederlanda, pola, rusa, kaj respondas senprokraste pri ĉiuj demandoj.

Ĉefa Oficejo : 15, G^{de} Place, Nieuwpoort (Belgujo).

Helpaj oficejoj { **25, rue Rodolphe, Antwerpen (Belgujo) :**
72, Av. Gaspard-Malo, 72, Malo-les-Bains (Francujo).

Esperante pri via bonvola helpo, kaj vin antaŭdankante mi sendas al vi la esprimon de plej samideanaj sentoj.